profet

| Reg | ID | IDSERV | IDURL | CODIF | NUMGRAM | NUMLEX | CL |
|---|---|---|---|---|---|---|---|
| | 6 | 5 | 5 | 1 | 5 | 5 | 100 |
| 5 | 000005 | www.bahai.de | /bahaaeligo/U-tekstoj/historio2-U.htm | 8 | 390 | 332 | religi;profet;komun;reven;sun;konsider;fac;teolog |
| 42 | 000042 | www.volny.cz | /malovec/tenebr3.htm | 8 | 108 | 88 | profet;tromp;jar;printemp;trov |

Registre: 0 Filtre: ?

Mon Sep 6 12:09:16 2004
/Library/WebServer/Documents/eo/pagines / tenim 563 registres

MALBONAUXGURA PACO

Pasis preskaux dudek jaroj de la tago, kiam Komenio kun siaj kunuloj forlasis la patrujon. Nekonata pastro farigxis kreinto de admirata instrumetodo, preparanto de nova filozofio, viro estimata de la sciencistoj kaj politikistoj. Sed kio estis cxio cxi kompare kun la sxanco, sxanco malfermigxanta, kiam finfine estingigxadis la flamoj de la milito, kaj la elsangintaj landoj vokis pri justa paco. La nostalgio pri la patrujo ne forlasis la ekzilitojn. Multaj ekzilitoj jam mortis, sed ilia lasta elspiro estis la vorto espero. La gepatroj per gxi vivnutris siajn adoleskantajn gefilojn. Iliaj filoj fordonadis por gxi siajn vivojn en fremdaj regimentoj. Kaj nun fine la milita supereco decide klinis sin al la flanko de Svedio kaj Francio. Generaloj Banner, Torstenson kaj Wrangel venkadis la imperiestrajn, kaj la svedaj kaskoj jam brilis super la piedpremitaj kampoj de Bohemio kaj Moravio. La ekzilitoj kortusxite ripetis la vortojn de Oxenstierna, ke la evangelianoj ne estos plu en la euxropaj landoj nur tolerataj, sed ke ili devas farigxi iliaj plenrajtaj civitanoj. CXiuj sekvis la traktadon pri la paco en Mu"nster kaj Osnabru"ck kun angora atento. CXu fine oni redonos la liberecon al la cxehxaj landoj?

GXojaj mesagxj anoncis, ke la generalo Koenigsmark jam ekstaris antaux Prago kaj konkeris la Kastelon; alia sveda armeo staris en la sudo de Bohemio.

Sed informoj pri la pactraktadoj forbruligis la esperojn kiel kruela frosto tro fruajn florojn. Ta°bor, pri kies forto la cxehxoj esperis, malrapide disfaladis. La holandanojn ne plu minacis la hispana superforto. Francio okupigxis pri siaj internaj konfliktoj. La germanaj protestantoj interesigxis nur pri la propraj avantagxoj. Kristina, malpacience sopiranta la regadon sen kuratorado de la kanceliero, insistis pri paca interkonsento, gxi kostu kiom ajn, kaj Oxenstierna perdadis la influon; cetere lia interesigxo pri la laboro de Komenio kaj pri la sorto de la cxehxaj elmigrintoj estingigxis. La katolika partio ekvidis sian sxancon, cedis de la religia linio kaj limigxis je politikaj traktadoj. Tio permesis al la senditoj de imperiestro Ferdinando III, kiu sekvis spurojn de sia patro, resti surdaj al mencioj pri la cxehxaj landoj. CXiam pli akre konturigxis terura eventualo, ke la politika situacio similos al la jaro 1624, al la situacio post la batalo sur la Blanka monteto, kaj per tio la sorto de la cxehxoj estus forsigelita.

Post morto de episkopo Justin la Unuigxo elektis Komenion kiel lian anstatauxanton; li do devis forlasi Elbla.g kaj translogxigxi denove al Lesxno. Li decidigxis por tio kun trankvila konscienco, sed treege deprimita; la celo de kelkjara peza laboro estis denove neniigita, estis senutile, ke li servu plu al la svedoj, kiuj lin preterlasis.